# Ave, stelo mara

## AVE, MARIS STELLA • ADORU 689




2. «Ave» sonis beno / ĉe l' anĝela veno.
   Pace ŝirmu homon, turnu «Eva»-nomon.

3. La pekantojn gracu, / blindajn do kuracu,
   la malbonon premu, ĉion bonan semu.

4. Montru vin patrino, / ke Li pro inklino,
   esti via filo, / helpu en humilo.

5. Virgulino glora, / vi, la plej bonkora,
   nin de kulp' malligu, / nin per ĉast' plenigu.

6. Donu vivon puran, / vojon plej sekuran.
   Montru via filo / sin en ĝoja brilo.

7. Al Di-Patro gloro, / al la Fil' honoro
   kaj al la Spirito / laŭdo kaj konfido.

AVE, MARIS STELLA • *STAR OF SEA AND OCEAN • M: Caspar Ett, VH 130 • latina T: 8a/9a jarcentoj de nekonata monaĥo • angla T: R. Wright • E: Guido Holz 1986 • 2001 en ADORU 689